# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 - PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 - LE PERREUX-sur-MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE 11, cours Léopold 54042 - NANCY Cédex

C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN.

====== la n°: 3 F. Abono: 13 F. Kotizo: 2 F. Sume: 15 F. ======

+++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaù la 10-a de marto, junio, septembro kaj decembro.

+++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

==== N° 126 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== OKTOBRO 1980 ====

+++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## BILETO DE LA PREZIDANTO.

La pause de l' été se termine. Les activités quotidiennes reprennent: études, profession vont de nouveau s' emparer d' une partie du temps de chacun. Mais le sens de la vie en société nous porte aussi à enrichir nos loisirs d' une activité apte à apporter un profit moral ou culturel à soi et aux autres.

J' aimerais croire que des jeunes seront nombreux à lire ce billet... mais je sens bien que c' est à travers des adultes que je dois leur adresser un appel.

Ces garçons, ces filles vont prendre possession du monde que nous leur légons, après en avoir hérité nous-mêmes. Au point de vue matériel, dans tous ses aspects, scientifique, technique, utilitaire, que d' admirables progrès, théoriquement tournés vers l' acquisition d' un niveau de vie meilleur. Mais est-ce là le vrai progrès humain, si l' intelligence ne s' applique pas d' abord à ce qui fait sa supériorité sur tout ce qui l' entoure: les facultés de son âme, qui la portent à regarder en haut, à vivre pour autrui autant que pour soi-même, à entrer à fond dans le plan divin qui place avant toutes les vertus l' amour de Dieu et du prochain.

On verrait moins de crimes, d' attentats, de tortures, d' invasions, d' atteintes aux libertés légitimes, si de par le monde, l' éducation était porteuse de cet amour de l' homme: droits de l' homme, oui, mais surtout devoirs corollaires de ces droits.

Mais l' un des besoins qui dérivent de cet amour, c' est de pouvoir communiquer. La parole, propre de l' humain, véhicule de la pensée et des sentiments, est le lien profond entre proches, elle rapproche ceux qui sont loin. L' une des principales acquisitions de notre temps, c' est la facilité, l' extension, l' universalité de la communication.

Mais hélas! le rapprochement personnel de pays à pays, les rencontres internationales, tous ces échanges qui aideront puissamment au progrès moral, à la compréhension réciproque, à l' amitié, à la culture de notre temps, sont limités par la barrière des langues.

../...

C' est pourquoi il faut proposer aux jeunes, comme activité de loisir, avec le désir de correspondre avec les pays proches ou lointains, la langue internationale qui en est le moyen. Il faut que les associations de jeunes, les groupes de loisirs adoptent l' Esperanto, en attendant que son enseignement soit introduit dans les écoles, mais que cette étude soit immédiatement orientée vers des contacts internationaux avec d' autres jeunes. Ainsi doit s' établir un fructueux échange, par les lettres, les rencontres, les voyages, les camps, l' accueil réciproque dans les familles.

Il ne s' agit pas là d' une utopie: caux qui ont fait ces expériences ont pu constater combien elles sont fructueuses et éducatives. Et, bien entendu, combien elles motivent les garçons et les filles qui ont pu ainsi appliquer dans la pratique et développer les notions élémentaires facilement acquises.

Qu' entre jeunes chrétiens, en particulier, ces échanges s' amorcent et se développent, afin que, prenant conscience de l' existence des autres, différents et complémentaires, ils deviennent dans l' avenir les artisans de cette fraternité humaine, respectueuse du pluralisme, mais cependant attachée à la notion de l' Unité et de la communauté de destin de l' humanité.

R. Cl. COLAS

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## AL DIO

Vi estas la sola sankta, Sinjoro Dio,
kiu faras mirindaĵojn!

Vi estas forta, Vi estas granda,
Vi estas la Plejaltulo,
Vi estas la Tutpotenculo,
Vi, sankta Patro,
Reĝo de la ĉielo kaj de la Tero...

Vi estas karitato, amo,
Vi estas saĝeco, Vi estas humileco,
Vi estas pacienco, Vi estas sekureco,
Vi estas ripozo, Vi estas festa ĝojego,
Vi estas riĉeco kaj abundeco.

Vi estas nia espero, Vi estas nia fido,
Vi estas nia granda mildeco,
Vi estas nia eterna vivo,
Granda kaj admirinda Sinjoro,
Dio tutpotenca,
Milda kompatanta Savanto.

Sta Francisko el Asizo.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## RADIO ROMA - ESPERANTO — NOVAJ REGULOJ POR LA EKSTERLANDANOJ

Teksto de Testa, traduko de Antonio de Salvo

Pli severaj reguloj pri la eniro kaj la restado de la eksterlandanoj en Italio estis prilaboritaj de la itala registaro. La eksterlandanoj, kiuj havas nek pasporton nek aliajn taŭgajn legitimilojn, aŭ sen la bezonataj vizoj, estos kondamnitaj ĝis unu jaro de karcero kaj unumiliona monpuno. Kiu donos laboron al eksterlandanoj sen restadpermeso, aŭ sen rajtigo de la laboroficejoj, devos pagi monpunon de 300 mil liroj ĝis 3 milionoj. Se la labordonanto prizorgas butikon, li (provizore aŭ definitive) estos senigata je la koncerna rajtigo. La eksterlandanoj devos sin prezenti al la polico en la daŭro de 8 tagoj post la eniro en Italion por prezenti siajn dokumentojn. Turismaj permesoj validos nur 30 tagojn. Estos punataj ne nur la eksterlandanoj, kiuj kontraŭleĝe eniras Italion, sed ankaŭ la favorantoj de tiaj kontraŭleĝaj eniroj. Oni kalkulas, ke nuntempe vivas daŭre en Italio (plejparte kontraŭleĝe) 500 000 eksterlandanoj.

* * *

LA ROMANO DE CROY ( daŭrigo kaj fino)

La Fraŭlino diris, ke ŝi deziras katolikiĝi, sed provizore sekrete, sen la devo viziti la preĝejon je dimanĉo. Pri tio la episkopo ne konsentis. (RDLT: oni estis pli severa en tiu tempo). Verŝajne ŝi ne diris al la paroĥestro, ke ŝi malsanetas, kio baldaŭ pligraviĝis. Tiam ŝi ne povis plu viziti la preĝejon kaj per interveno de kuracisto ĉio klariĝis kaj ŝi ricevis la bapton en la jaro 1871. Nun ŝi estis kvieta kaj feliĉa. Tuj, kiam la solenaĵo estis finita, ŝi vokis al si sian fidelan servistinon Johannan kaj demandis ĉu ŝi scias, kiom da protestantoj estas en Stiphout. La servistino konsterniĝis kaj nenion respondis. Sed la Fraŭlino insistis kaj la servistino kuraĝis diri: "Vi sola Fraŭlino, alian mi ne konas." "Tio estas erara, mi estas katolika!" La servistino komprenis kaj svenis pro emocio kaj ĝojo. "Mi volas fari el mia kastelo ne ĉasdomon, okazis ĉi tie jam sufiĉe da malbono, devas esti fino al tiuj diboĉoj kaj orgioj", ŝi antaŭe jam diris al la bierfaristo. Ĝuste pro siaj maldecaj teniĝoj, la parencoj, kiuj volis meti ŝin sub kuratoran protekton, sin mem prirabis de la posedaĵoj kaj per testamenta deklaro fariĝis efektive: Croy post ŝia morto monaĥinejo!

La 19-an de marto, festo de s-ta Jozefo 1873 ŝi mortis en sia kastelo Croy post ricevo de la lastaj sakramentoj. La entombigo estis kiel eble plej pompa, sed neniu el la parencoj ĉeestis, ŝiaj frato kaj kuzino Cornelia dume jam estis mortintaj. Antaŭe ŝi volis ripozi ĉe siaj parencoj en la protestanta tombejo, sed poste ŝi ŝanĝis tiun deziron kaj nun ripozas en benita tero, sur la katolika tombejo, flanke de la paroĥestro de Stiphout (nun komunumo Helmond). En la kastelo antaŭe estis monaĥinoj; nun restaŭrita, ĝi estas vizitebla en difinitaj horoj.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

LA FKEA-KONGRESO EN SENS

Sabaton, 31-an de majo, posttagmeze, la kongresanoj alvenas al la monaĥinejo, kie la Dominikaninoj ilin bonvenigas. Rapide oni interkonatiĝas.
Je la 17.00, ni vizitas la belegan katedralon, sub la lerta gvidado de S-ro Bruce, membro de la arĥitekta asocio, kaj la ekspozicion pri tiu katedralo en la proksima urbodomo.
Post la vespermanĝo, S-ro Colas prezentas lumbildojn pri Palestino.

Dimanĉon, 1-an de junio, post la ĝenerala kunveno (v. artikolon en bulteno nº 125), P-roj Bourdon kaj Schneider kuncelebras la diservon. P. Bourdon predikas pri la Sankta Triunuo. Posttagmeze, religiulino vizitigas la kapelon kaj la kripton de la monaĥinejo, kaj donas multajn klarigojn pri sia kongregacio.
Poste okazas la prelego de P. Bourdon pri: "La katolikoj kaj Eŭkaristio". (v. artikolon).
Dum la vespero, la ĝenerala vikario P. Rouyer partoprenas nian manĝon, aŭskultas kun intereso informojn pri Esperanto kaj respondas diversajn demandojn (la ĉefepiskopo ne povis veni, ĉar li partoprenis en Paris la akcepton de la Papo).

Lundon, 2-an de junio, la kongreso finiĝas!...La esperantistoj forlasas, kun bedaŭro, tiun belegan monaĥinejon, kiu iĝis dum kelkaj tagoj nekomparebla kongresejo.

Protokolis G. PREUX.

* * *

LA KATOLIKOJ KAJ EUKARISTIO.
(prelego de P. Bourdon)

En Eŭkaristio estas unue signo: pano kaj vino;
due la realo de tiu signo: la korpo kaj la sango de Kristo;
trie per Eŭkaristio la membroj de la Eklezio, kiuj formas la Popolon de Dio, unuiĝas al Dio kaj al la aliaj kristanoj.

Ofte la katolikoj vidas la du unuajn partojn. Ili estas fidelaj al la volo de Dio, kiu diris: "Prenu kaj manĝu, tio estas mia korpo".

Estas bone, sed nesufiĉe. Estas tro da individuismo.

Pri supera realo necesas pensi. Per Eŭkaristio, la regno de Dio venas: 42 fojojn oni parolas pri la regno de Dio en la Evangelio!

Tiel, ni estas la iloj de Kristo, kun Kristo. La pastroj estas por la Eklezio. Kun ili, ni devas labori por forĝi tiun Eklezion. Ni estas la kooperantoj, la helpantoj de Kristo.

Kiam ni estas sub la puŝo de la Sankta Spirito, ni povas agi supermezure.

../...

La sanktuloj tion faras.

Komuniiĝi estas "ricevi" nian ĉefon, ne kiel objekton, sed "akcepti" vivantan personon, en fido, espero kaj amo. La vivo kaj fine la morto estas nur limo inter du landoj: la tera patrio kaj la ĉiela patrio. Tiam, nia fido iĝas la vidado de Dio; nia espero, la posedo de Dio; kaj nia amo, la karitato de Dio, kiu neniam pereos.

Post la prelego, la kongresanoj diskutis pri diversaj demandoj. Unu el ili altiris la jenan konkludon: ni devas pli bone vivi kaj vivigi Eùkaristion en ĝia universala radiado. Ĝi devas influi nian konduton, nian agadon.

Por pli bone meriti la nomon "katolikoj" kaj "katolikaj esperantistoj", por ke ĉiuj popoloj unuiĝu en Eklezio por laùdi Dion, la plej adaptita rimedo estas Eùkaristio.

Resumis G. PREUX.

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§

BIBLIA NOMARO ( daùrigo)

AĜO

Certe la maljunuloj posedas plenan saĝon,
Ĉar pro longa vivado kaj sperto grizharuloj
Marŝas sur justa vojo estante verstimuloj
Al tiuj, kiuj havas nun malpli grandan aĝon.

Fakte ili alportas ĉiam novan mesaĝon
Pri amado, frateco. En iliaj okuloj
Brilas matura bono: avoj estas speguloj
De plej paĉja tenero malŝlosinta dolĉkaĝon.

Ve! Kune kun la jaroj alvenas la mallerto
En parolo, gestado kaj en mema konduko
Kaj foje vigla cerbo proksimas al inerto.

Nun malfacile ŝprucas la eldirfajna suko,
Ĉar pro la sanga laco naskiĝas en kapverto
La plej aĉa malordo: la pripensa kaduko.

19/2/1978.

AĤAB ( reĝo)

Estante dudekjara li reĝas jam potenca:
Komprenint e, ke Judoj loĝante malsamlande
Sed naskas solan genton, naskiĝinte sambande,
Ilin li interligis al si per ĉef' parenca.

Kontraù la damaska popolo dekadenca
Li dufoje batalis kaj fine venkis grande
Revenis siahejmen kun florkrono glorskande
Pro sia ĝojo plena kaj fame rekompenca.

Sed kial do, ho Aĥab, vi, forgesante Dion,
Incensis fibaalon influe de la edzin',
Persekutis profetojn, starigis liturgion

Nepre malpermesitan de kredofida doktrin'?
Ĉu pro tio submure vi perdis l' ovacion,
La urbon kaj la vivon en militema obstin'?

20/2/1978.

AĤAB ( falsa profeto)

Aĥab, kelaja fil', malvera profeto,
Kiu dianome per falsa vort'
Mensogis al ĉiuj pri vera sort'
De l' Judoj en Babel' laù stumbla dekreto.

Profet' Jeremio el via kvieto
Eltiris vin akve per voĉa vort',
Aĥab, kelaja fil', malvera profeto,
Kiu dianome per falsa vort'...

Kaj tuj via parol' pro lia pamfleto
Fariĝis subite nura abort'.
Iru de mensogist' al fajra mort':
Malaperos ĉie eĉ via skeleto.
Aĥab, kelaja fil', malvera profeto.

21/2/1978.

## INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA KAJ ESPERO KATOLIKA

I.K.U.E. partoprenigas nin en la internacia katolika Esperanto-movado.
E.K. respegulas por ni la internaciecon de nia katolika Esperanto-movado.
Ĉiujare ĉirkaŭ 60 Francoj estas membroj de IKUE. Tio estas ja bona, tamen ne sufiĉas. Fakte tiu nombro estas proksimume la kvarono de la membroj de FKEA. Ni do povus esti multe pli en IKUE.
Alia bedaŭrindaĵo jenas: ne ĉiuj abonantoj de EK renovigas akurate sian kotizon. Kelkaj ĝis nun eĉ ne pagis sian kotizon en 1979. Tio grandigas la laboron de la franca peranto kaj malgrandigas la monon de la internacia kaso.
Frate mi petegas ĉiujn niajn membrojn, kiuj ankoraŭ ne pagis sian abonon last- kaj ĉi-jare, bonvolu tion fari kiel eble plej rapide.
Antaŭdankon afablan mi sendas al ĉiuj, kiuj aŭskultos mian alvokon.

Roger DEGRELLE, peranto
de IKUE por Francujo.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## ESPERANTO EN LA "MUELEJO DE LA METILERNANTOJ".

Sekve de alvoko lanĉita de la Prezidanto de tiu asocio komence de 1980, sin prezentis kelkaj kursgvidontoj. Ili partoprenis kun la gejunuloj en diversaj manaj aktivaĵoj, kaj instruis la Internacian Lingvon al 8 Francoj, 1 Germano, 1 Togolandano kaj 1 Alĝeriano.
Tiuj, kiuj ŝatas aktive pasigi sian libertempon kaj diskonigi Esperanton povas peti informojn ĉe: Charles Chareille Moulin des Apprentis 23220-BONNAT

Eltiraĵo el la raporto de G. Mazaud el Châteauroux.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## INFORMOJ.

1) La familio E. K. WOZNIAK str. Sasiednia 3 26-600 RADOM POLLANDO (100 km sude de Varsovio) proponas senpagan gastigadon.
2) Internacia kultura semajno en Stykkisholmur ( Islando) 18/24-a de Julio 1981. Temo: naturo, literaturo, historio. Informas: Islanda Esperanto-Asocio Postholf 1081 REYKJAVIK ISLANDO.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## NIA MEMBRARO.

Ni ĝojas bonvenigi en niaj vicoj la jenajn novajn anojn:
10) F-ino MARTIN ( A-M); 11) S-ro PERDRAUD ( Gironde); 12) S-ro LECONTE ( Nord); 13) F-ino ESPITALIER ( A-M).

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## NEKROLOGO.

Niaj fidelaj longjaraj membroj S-roj LECOCQ kaj LHERBIER funebras pro la forpaso de siaj edzinoj.
Ni prezentas al ili niajn fratajn kondolencojn, kaj preĝas por la ripozo de tiuj du animoj.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## KELKAJ TANKAOJ, de Roger DEGRELLE

Serpento ruza
Aliras la edzinon
Kun voĉo dolĉa.
La plendo nur akuza
Estigos aĉan finon.

La akvo fluas
Serpente ĝis la maro,
Revenas poste
Se la sunvarmo fruas
Al la pluva preparo.

Komence Dio
La teron kaj ĉielon
Estigis patre,
Aldonis kun gracio
La priluman sigelon.

Kunulas tero
Al maro mozaike
Plej fekundiga
Kaj fruktas senmodere
Ne nur apudtropike.

L' unua tago
L' unuan nokton ĉenis
Kaj nun senfine
L' alia homa ago
L' unuan postalvenis.

La difavoro
Prisemis tutan teron
Diverskarese.
Alportis ĉi fervoro
La riĉan varsomeron.

* * *

AGADO E3 MOBILIZAS ESPERANTISTOJN KAJ NEESPERANTISTOJN...

Ni donu iom da lumo al Kameruno!!

La gazetaro raportas detale pri grandaj partoj de la mondo, kiuj suferas malsaton kaj sopiras panon. La celo de ĉi tiu informilo sekve ne povas esti alia ol instigi vin al helpado, grandskala kaj amasa. Mi pledas por tio; ke ĉiu nia kontribuo al Agado E3 estu "kromaĵo", aldono al tio, kion ni jam kutimas fari.

Milionoj da homoj bezonas panon. Aliaj milionoj vivas en mallumo kaj bezonas okulojn vidantajn. Ili estas blindaj, sed hazarde blindaj, ĉar ili povus vidi, se ilin povus atingi okulkuraca helpo. Ili loĝas en ĉiuj evolulandoj de la mondo. Inter tiuj, kiuj klare vidas ilian maldolĉan sorton, apartenas la anoj de la ideo de la homama pola okulisto, D-ro L.L.Zamenhof, kiuj jam dum 14 jaroj subtenas projektojn en Afriko, kie 17 el 2000 homoj estas blindaj (3 el 4 nenecese blindaj). Nia nuna kampanjo direktas sin al Kameruno, okcidentafrika lando, kiun terure kaj senkompate frapas riverblideco. Tie la helpo havu karakteron ĉefe preventan.

Ni intencas helpi al la protestanta malsanulejo de Ndoungué en Nkongsamba, estrata de la kameruna konsilantaro de Eklezioj baptistaj kaj evangeliaj CEBEC; ĝi havas bonan reputacion sur oftalmologia tereno. Tie laboris du nederlandaj okulistoj dum vico da jaroj, sed ĵus transprenis la taskon tiulanda okulkuracisto, kiu studis oftalmologion kaj ĥirurgion en Francujo. Ni deziras al li multe da sukceso kaj volonte promesas nian laŭeblan subtenon!

Kiel agadisto mi nun ŝatus montri al vi konvinkajn kaj imponajn fotojn kaj bildojn de konstruaktivaĵoj, sed tio - bedaŭrinde - ankoraŭ ne eblas. D-ro Gerard VAN NOORT, la estro de la malsanulejo, skribis al mi antaŭ nelonge, ke ĝis nun ne prezentiĝas tute preta plano, kiun aprobis la registaro kaj CEBEC, sed ke oni deziras forlasi la komencan ideon intencantan renovigi kaj adapti kelke da klinikaj ĉambregoj. Tio estas bonega solvo por la hodiaŭa tempo, sed fakte signifas malŝparon de mono, se oni konsideras la aferon per postmorgaŭaj okulvitroj. La direktoro miaopinie prave kaj emfaze antaŭenpuŝas la realigon de ampleksa plano, kiu celu reorganizi la okulkuracan helpon en la malsanulejo kiel tuto. Flanke de tio li varme bonvenigus la instaladon de t.n. okulvitrejo aŭ optika laborejo.

Ndoungué estas ĝenerala malsanulejo, kiu jam longe ekzistas (escepte de akuŝkliniko, kiu konstruiĝis antaŭ dek jaroj). Planado en la estonteco urĝe necesas por garantii ĝian kontinuecon. En la venontaj jaroj granda parto de la konstruaĵoj bezonas renovigon. La unua fazo konsistas el la realigo de nova operacia komplekso kaj pavilono kun ĉ. 80 litoj, destinitaj speciale por urĝaj kazoj, ĥirurgio kaj oftalmologio. Tiu komplekso havu almenaŭ du operaciajn ĉambrojn (nun estas nur unu) por apartigi sepsajn de kontraŭsepsaj operacioj. La kontribuo de nia kampanjo povus esti direktita al la efektivigo de la koncerna konceptplano. Unu el la operaciaj ĉambroj estos uzata ĉefe por okulpacientoj. Nu, ni komencu la konstruadon. Eble en decembro venonta mi povos prezenti pli da detaloj.

Laŭ ĉi tiu vojo mi deziras esprimi mian sinceran dankon al ĉiuj esperantistoj kaj neesperantistoj en la tuta mondo pro la konvinkaj pruvoj de helpo kaj inventemo. Preskaŭ ĉiutage la poŝto portas viajn pakaĵojn al mia adreso, kaj ĝis nun ĉio montriĝis vendebla kaj monigebla.

Multe da afablaj homoj helpis al mi dum la pasintaj monatoj, ĉefe el orienta Eŭropo. T.n. "nepagipovaj" landoj kune kontribuis 7200 ned. guld. en la formo de libroj, pupoj, infanludiloj, diskoj, teksaĵoj, poŝtmarkoj, kalendaroj... Multan dankon pro tiom da kuraĝigaj signoj de amataj gefratoj el landoj, kies ekonomio fakte ne ebligus tiom da oferoj!

Karaj geamikoj de Agado E3, ĉu niaj gefratoj en Kameruno povas esperi nian helpon ankaŭ en tagoj, kiam ĉiuminute 28 infanoj mortas pro malsato? Ĉu ni tamen donu iom da lumo al blinduloj kaj okulpacientoj en tiu afrika lando? Ni estas ja esperantistoj, parolantaj "lingvon de espero" kaj dezirantaj praktiki tion, kion D-ro Zamenhof nomis "la interna ideo"...

Por ĉiuj informoj, sin turni al Jacques TUINDER Henegouwenlaan 35 - 1966 RH HEEMSKERK NEDRELAND. La mondonacojn oni direktu al RABOBANK Beverwijk Rekening (konto) 10.73.00.990:Aktie "OOG VOOR KAMEROEN" Rekeningnummer (p.ĉ.k. de la banko) 151093.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

LA 65-a U.K. EN STOKHOLMO.

Multaj homoj havas severan opinion pri Skandinavio. Ĉar ĝi situas norde de Eŭropo, ili grimacas, tuj pensante pri nebulo, pluvo kaj malvarmo. Tamen ofte la tieaj someroj estas tre belaj kaj varmaj. Sed ĉijare, ne estis pli bele ol ĉe ni. Tamen, malgraŭ la ofte griza ĉielo, pli ol 1800 homoj el 51 landoj vizitis la sve-

../...

dan ĉefurbon okaza de la U.K., kaj ili ne bedaŭris sian kelkfoje tre longan vojaĝon, ĉar ĉio disvolviĝis tre glate: bona organizo, interesaj kunvenoj, altnivelaj prelegoj, spritaj debatoj pri ĉiuj facetoj de la ĝenerala kongresa temo "diskriminacio", ravaj ekskursoj ĉu perŝipe tra la Stokholma arkipelago, ĉu per buso al la universitata urbo Uppsala, ĉu al diversaj kasteloj kaj muzeoj, bongustega bankedo, artaj vesperoj kaj balo, nenio mankis.

Por ni, kristanoj, la kulmina punkto de la programo estis la ekumena diservo en la vasta luksa katedralo absolute plena. Post la legado de la bibliaj tekstoj kaj la tre belaj kantoj enkondukitaj de la pastoro, post la preĝoj komunaj al ĉiuj kristanoj frate unuigitaj, la Eŭkaristion kuncelebris P. Bourdon, P. Kao el Ĉinujo kaj P. Thalmaier el Germanujo. Kiel kutime okazis dum la kongreso IKUE-kunveno, pri kiu aperos raporto en "Espero Katolika".

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## LINGVA ANGULO

Ĉu kulpas la somera libertempo? Nur kvar tradukintoj "laboris" pri la proponoj aperintaj en la bulteno nº 125, nome S-roj BOURGOIS (B), DAUCHEZ (D), LE MARQUAND (L) kaj S-ino MICHAU (M). Jen la rezulto de ilia cerbumado:

1) être en fonds: esti monhava/mone bonstata, disponi monon (B); esti bone monprovizita (D); disponi monrimedojn (L); esti riĉa, havi disponigeblan monon (M).

2) forcer le destin: trudŝanĝi sian destinon, superregi la destinon (B); venki la malbonan sorton (D); kontraŭstari al la fatalo (L); memhelpi la sorton, devigi la destinon (M).

3) cette histoire est forgée de toutes pièces: tiu rakonto estas tute elpensita/pura fabelaĵo (B); tiu historio estas tute fiaranĝita (D); tiu tuta historio estas image forĝita (L); jen rakonto tute fantazia (M).

4) en son for intérieur: laŭ la juĝo/verdikto de sia konscienco (B); en sia interna menso (D); en sia konscienco (L); en sia profunda konvinko, laŭ sia konscienco (M).

5) il va faire du foin: li faros skandalon (B); li tuj akre reagos (D); li laŭtege bruos, li bruegos (L); bruege li protestos/kontestos (M).

6) il peut toujours se fouiller: li esperu tute nenion, por li vanus esperi (B); li certe fiaskos (D); li vane fosos en siaj poŝoj, jam vane li esperas (L); li longe povas atendi, li povas vane esperi (M).

7) il n' en fiche pas une ramée: li faras tute/kvazaŭ nenion (B); li tute ne laboras (D); li estas malproduktema (L); li neniel penas, eĉ ne laboreton li faras (M).

8) il s' en fiche royalement: li fajfas pri ĝi, ĝi glitas de li kiel pizo de muro, li zorgas pri ĝi kiel pri neĝo pasintjara, ĝi tuŝas lin kiel akvo anseron, ĝi eĉ ne tuŝas lian orelon (B); li tute malzorgas (pri tio) (D, L); li estas tute indiferenta pri tio (L); li superece indiferentiĝas, li reĝece senkonsideras tion (M).

9) nous voilà frais! neenviinda/senelireja estas nia situacio (B); jen ni kaptitaj, ne restas ŝanco por ni (D); jen ni senhelpaj (L); jen ni freŝbrilaj (M).

10) faire les frais de la conversation: esti la nura priparolataĵo (B); esti malfeliĉa temo de klaĉado (D); liakoste nutriĝas la konversacio, la konversacio temas pri li (L); nutri konversacion (M).

Jen la definitiva klasifiko por 1980: 1) en egaleco S-ino MICHAU kaj S-ro RIBOT (19); 3) S-ro LE MARQUAND (18); 4) S-ro DAUCHEZ (17); 5) S-ro BOURGOIS (15); 6) S-ro DE SALVO (2); 7) S-ro GUILLON (1).

Sekve, S-ino MICHAU kaj S-ro RIBOT gajnas premion en valoro de po 25 F, S-ro LE MARQUAND premion en valoro de 30 F kaj S-ro DAUCHEZ premion en valoro de 20 F.

La kvar gajnintoj bonvolu skribi al la kasistino pri siaj deziroj: abono al gazeto, aŭ libro(j), aŭ kreditkarto.

Per la ĉisubaj proponoj de S-ro Bourgois komenciĝas la konkurso 1981 kun la jenaj premioj: 1) 50 F; 2) 30 F; 3) 20 F.

../...

Novaj tradukotaj esprimoj:

1) franc comme l' or; 2) c' est un franc diable; 3) franchir la cote d' alerte; 4) franchir le mur du son; 5) se frayer un passage; 6) frétiller comme une anguille; 7) c' est pour la frime; 8) friser la quarantaine; 9) friser la correctionnelle; 10) il ne fait pas bon s' y frotter.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

INVITO AL INTERNACIAJ SKIFERIOJ

LOKO: Villanders/Sudtirolo/Italujo. DOMO:"Tannötscherhof". 11 ĉambroj; 38 lokoj.
TEMPO: 27/12/80 - 3/1/81. PREZOJ: 7 tranoktoj kaj ĉiutage matenmanĝo kaj vespermanĝo: Edukantoj kun infanoj: 180 GM

| | |
|---|---|
| aliaj plenkreskuloj: | 200 GM |
| infanoj ĝis 6-jaraj: | senpage |
| " 7/12-jaraj: | 100 GM |
| Junuloj 13/17-jaraj: | 150 GM |
| Teologistudentoj: | 100 GM |

CELOJ: krom skiado kaj libertempo, internaciaj renkontoj kaj E°-kursoj vespere.
KURSOJ: A = komencantoj sen antaŭscioj. B = lernantoj kun malmulte da scio.
C = Esp°-parolantoj legas kaj priparolas la Sanktan Biblion.
S = ludoj en Esperanto por infanoj.
INFORMOJ kaj ALIĜO: Katolika paroĥoficejo Kirchplatz 4 Tel. (0) 7721/54717
D - 7731 UNTERKIRNACH
GVIDANTO: Pastro Bernhard EICHKORN

* * * * *

SEMAJNFINOJ: 15/16/11/80 kaj 7/8/2/81 en Nigra Arbaro kun Esperanto-kursoj
PRINTEMPA SKIADO: 8/15/3/81 Serneus en Grizono/Svislando, ĉefe por teologistudentoj el Mezeŭropo.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

KOTIZTABELO 1980

IKUE kun "Espero Katolika" . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 52 F
Peranto: R. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

* * * * *

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" . . . . . . . . . . . . . . 15 F
Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj . . . . . . . . . . . 7,50 F
Bonfaranto . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 75 F
Dumviva membro . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 300 F

------

UFE kun "Revue Française" . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 90 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro . . . . . . . . . . . . . . . . . . 120 F

------

Abono al "Biblia Revuo" . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 36 F
Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

Dépôt légal: 4ème trimestre 1980 !! Polycopié par F. M. C.

Papier de presse n° 62 532 !! Prieuré St-Martin La HOUSSAYE-EN-BRIE

Directeur-gérant: Roger Despiney !! 77610 - FONTENAY TRESIGNY FRANCE